EKO 2023

Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

ilei UMEA IKEF

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

**EKO 2023 / 15. Marto 10 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

# UMEA ofertas praktikan plian helpilon

Jam pasis unu jaro ekde la komenco de la nuna rusa-ukraina speciala operacio, kaj neniu vidas la finon de tiu ĉi milito. Por helpi la ukrainiajn rifuĝintojn kaj ĉiujn medicinistojn, kiuj prizorgas ilin, nia internacia laborgrupo pretigis la esperantan-slovakan-ukrainan, esperantan-portugalan-ukrainan kaj albanan-esperantan-ukrainan medicinajn interpretistojn / tradukhelpilojn, kiuj belege demonstras la neŭtralan ponto-lingvan rolon de Esperanto.

Informoj de la Budapeŝta Medicina Klubo.

# Francaj rezultoj pri la stato de instruado

En Francio, Eo-kursoj okazas en lernejoj kie troviĝas agemaj esperantistaj lernejaj instruistoj. Amklaŭ Emeritaj lernejaj instruistoj sukcesas organizi tiajn kursojn. Tiuj kursoj okazas ĉefe en mezlernejoj (ĉu por 11/15-jaruloj, ĉu por 15/18-jaruloj), malofte en bazlernejoj. La kursoj estas ĉiam nedevigaj. La instruistoj devas varbi la lernantojn kaj motivi ilin por ke ili plu lernu. Okazas unuhora (aŭ malpli longa) leciono semajne do entute malpli ol 30 horoj/jare. Foje eĉ malpli. Kontaktoj kun klasoj en aliaj landoj, eĉ vojaĝoj por renkonti aliajn eo-lernantojn estas instigo al lernado.

Lernmetodoj por lernejanoj ne abundas kaj ĝenerale taŭgas por 60 horoj aŭ pli da instruado kaj ĝenerale ne okupiĝas pri motivado kaj uzado de la lingvo. Foje la instruistoj kreas propran instrumaterialon.

Mankas tre facilaj legaĵoj, tre facilaj filmetoj por lernejanoj; ekzistantaj estas malfacile troveblaj. Mankas helpo por organizi kontaktojn inter klasoj de aliaj landoj…

# Penseo 377

Trovu alkroĉitan la dokumenton por vidi la dokumenton por poeziemuloj kaj la plejlastan donacon por ili!

# Virinoj enplektitaj

Okaze de la internacia virina Tago, virina Asocio en DRKongo precize en Kinŝaso organizos konferencon la okan de marto 2023 kun la temo: "virinoj devas lerni novajn teknologiojn por batali kontraŭ la analfabeteco "

Alexandrine OMBA




# Plia kurso en Brisbano, Aŭstralio

De: **edukado.net** <redaktanto@edukado.net>la redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Brisbane Esperanto Society
Gvidantonomo: Doug Eising
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Brisbane, Aŭstralio
Aldoninto: Vere

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27520

# La Tago de la Lernejo portis eĥon en Rusio

En la paĝaro de fama informa agentejo «TASS» en la rubriko «Scienco» la 21-an de februaro dediĉe al Tago de gepatra lingvo aperis artikolo «Esperanto kaj aliaj artefaritaj lingvoj. Kial homoj serioze ne ekuzis ilin?» («Эсперанто и другие искусственные языки. Почему люди толком не стали ими пользоваться?»): https://nauka.tass.ru/nauka/17100957

La artikolo donas superrigardon de kelkaj lingvoprojektoj kaj kronas ĝin per sufiĉe ampleksa kaj adekvata (kvankam ne tro optimisma) materialo pri Esperanto. Estas menciitaj kelkaj faktoj pri L. L. Zamenhof kaj pri naskiĝo de Esperanto, la Bulonja deklaracio, klopodoj promocii Esperanton ĉe Ligo de Nacioj, UN kaj UNESKO, kaj eĉ tio, ke ekzistas denaskaj esperantistoj.

Aleksandr Lebedev.

# Plia bulteno el Novjorko pri nia laboro ĉe UN

**Numero 63 – marto – aprilo 2023**

- UEA markis la Tagon de la Gepatra Lingvo per tutmonda festado.
- Oficialaj pilkoj por la Monda Pokalo en Kataro liveris sian mesaĝon en Esperanto.
- Daŭripovo kaj migrado estos la temoj de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto.
- En konsulta sesio de EKOSOK, UEA substrekis lingvajn demandojn.
- El la hungara al la malta, pere de Esperanto.
- Afrika Komisiono de UEA renkontiĝis en Senegalo.
- La Esperanto-movado funebras unu el siaj plej respektataj figuroj: Andrea Chiti-Batelli.
- Universala Esperanto-Asocio salutis la Tagon de Virinoj.
- Je Edukada Tago 2023, UEA substrekis aliron al edukado kaj multlingvismon.

Klaku la ligon supre por aliri la revuon.




Vidu sur la sekva paĝo la omaĝon de EKO por la pioniraj kaj aktivaj virinoj de nia komunumo.

========= vortoj: 540 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.


Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.


**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

## Kelkaj elstaraj virinoj de nia komunumo








De supre: Teru Hasegawa (Verda Majo), Lidia Zamenhof, Alexandrine Omba, Claude Nourmont, Luĉija Borŝiĉs, Kati Kovats, Zsofia Kór ody, Eniko Zengð, Michaela Lipari. Nur kelkaj el multaj ebloj!